<antaŭvidaĵoj>

POR NINA HAGEN, LA NIFO-J SAVOS LA TERON

Nina Hagen, germana kantistino kaj unu el la bizaraj figuroj en "Rock in Rio" fiŝe mokonvinkiĝas,ke la NIFO-j (neidentigo - blaj flug-objektoj) ludos gravan rolon en iu eventuala atommilito."Ni ne devas timi katastrofon, kolapson de la planedo.Kaj ni ne devas timi, ĉar la timo malfaciligas nian oniron en la spac-ŝipojn.Nur la tre malbonaj homoj ne estos savkondukitaj.Ekzistas 35 milionoj da spacŝipoj-patrinoj kaj miloj da aliaj malgrandaj spac-ŝipoj,kiuj scios la ĝustan momenton por savkonduki la ter-loĝantaron en la kazo de katastrofo", ŝi diris en intervjuo.

STELOJ

literatura
ERNESTO SÁBATO



En intervjuo al la porto-alegro-a tag-gazeto "Zero Hora", demandito pri la malgrandeco de sia verkado (nur tri libroj), argentina verkisto Ernesto Sábato tiel respondis: "Mi verkis multe.Kaj kiel mi folisi radis!Kaj mi pravis.Mi opinias, ke se la plejmulto de la verkistoj tion farus, la homaro estud pli bonodora kaj la aero pli pura, ĉar multaj arboj ne estus oferitaj por esti transformitaj en sengravajn librojn".

futurologio
LA TRIA ONDO

Antaŭkelkesemajne la "tria ondo" estis temo de la TV-programero "Globo Reporter" (TV-Reto Globo,ciujaude, 21h30).Eĉsube komentario de Flavio PintoVieira al la semajngazeto "Jornal do País", kiun ni republikigas parte; pri la prezentajo:

Paroli pri la estonto ŝajnas facile.Du vidoj bazo estas je la dispono de la futurologoj.La pesimista estas tiu karakterizas la sociologojn kaj antropologojn timigitaj pri la kaoso de la nuntempo kaj signalas nigrajn perspektivojn por la homaro ĝis malsato kaj nuklea detruado.Kaj la optimista vido estas tiu kiu karakterizas la sociajn sciencistojn kiuj jam detektis en la aktualaj tagoj la indicojn de iu favorega estonto por la homaro.Ti i vido, la optimista, ĉestas en la verkaro de Alvin Toffler, usona ponsulo, aŭtoro de du bone akceptitaj laborajoj, "La Ŝoko de la Estonto" kaj "La Tria Ondo", kies teorioj fariĝis materialo de la realigita dokumentario.Por Toffler, la historio de la homaro fariĝas pere de tri ondoj: la unua rilatas al la malkovro fare de la homo de la agrikultura komunumo, ekhavante tiam fontojn de manĝo kaj novajn ricaĵojn; la dua ondo de la ŝanĝo aperis kun la Industria Revolucio, dank'al la transloko de la centro de la civilizacio al la fa

ideoj
SENNACIISMO

"Ĉu la kara leganto iam kaj jam pripensadis pri la nocio: "Sennaciismo"?Tio estas ismo , kiu forigas la ideon de"nacio" aŭ, pli bone , unuigas la tutan homaron en unu nura nacio.Ponsu ni: la tutmonda popolo formi unu nuran regnon; la tuta tero esti la lando, la patrio; ĉiuj rasoj konsistigi unu nuran genton; ĉiuj homoj interkomunikigi, paroli per la sama lingvo; ĉiuj homoj kulti la saman dio: la Homo; ne plu esti motivoj por bataloj , militoj kaj eksploatadoj; ĉiuj homoj pace labori kaj vivi en iu ajn parto de la mondo sen subpremoj; ĉiuj homoj finfine respekti unu la alian...Tio estas "Sennaciismo", tio estas, ho ve!, la infinitiva formo de nia utopia mondo sennacieco. (Gilbert R.Lędon, en sia libro "Zé do Burro)

statistikoj
Se nur 60%...

Se nur 60% de la 800 miliardoj da usonaj dolaroj elspezitaj en armiloj en '83 estus eluzitaj en sociaj bonfiĉoj, ili estus sufiĉaj por konstrui 600 mil lernejojn, kiuj lernigus 400 milionojn da infanoj; aŭ 30mil hospitalojn kun 18 milionojda litoj; aŭ 50 milionojn da apartamentoj , kiuj ŝirmus 300 milionojn da homoj senhejmaj.

DESSEAK 1985 - 10 JAROJ JE LA SERVO DE ESPERANTO

ESPERANTO-GAZETO DE "DESSEAK"-DEPARTAMENTO DE ESPERANTO DA SOCIEDADE ESPÍRITA "ALLAN KARDEC" ANDRADE NEVES,60 90000

PORTO ALEGRE, RS BRAZILO 2-a JARO N-RO 5 SOMERO 1985

La Tria Ondo - daŭrigo

brikoj, kauzante la malbonaĵojn de la industriigo: amasigo, urba koncentrado, poĉucio, sendungado, inflacio kaj sociaj strôĉoj; kaj la tria ondo - jam ekzistanta en Japanio kaj Usono - estas ekaperanta en la kontekste de la "dekadenco de la industriigo". En la intervjuo donita al la reportero Lucas Mendes, kaj kiu estis aldonita al la dokumentario, Alvin Toffler, deignalante, ke en la mezo de la 50aj jaroj la raketoj, la televidiloj, la naskkontrolo kaj la komputiloj inaŭguris la alvenon de la estonto, observas, ke tiu "movado" kondukos min al iu vero homana civilizacio, kiu obligos la homon reakiri sian individuecon kaj ekzerci sian kreivecon pere de la teknologia revolucio". Reakiro de la individueco kaj ekcerco de la kreiveco: ĉi tiuj estas la du aferoj kiuj igas la esencon de la optimismo de Alvin Toffler kaj kiuj metas lin flanken de aliaj pensuloj kiuj ankaŭ kredas je iu plibona estonto por la homo - kiel Erich Fromm aŭ Sartre, ne parolante pri Marx kaj Freud.

esperanto

LA PROBLEMO (?) PRI DISDIALEKTIĜO

"Miaj pripensoj povus ŝajni iom negativaj: geografia variado de Esperanto estas nekontestebla kaj neevitebla; ĉu tio do signifas, ke la fifama "disdialektiĝo", kiun tiel timas la esperantistoj, estas fatala? Al tio mi respondu: jes, sed tio tute ne gravas! "Disdialektiĝo" ne signifas "dislingviĝo", ĉar la karakterizo de plurdialekta lingvo (tio estas pleonasmo, ĉar ĉiu lingvo estas plurdialekta, ne ekzistas ideale homogena lingvo) estas la ebleco de interdialekta interkompreniĝo. "La problemo de interdialekta interkompreniĝo en Esperanto" ĝuste estas la temo de mia verkota doktoriga disertacio, do mi povos prezenti kompletan studon nur post kelkaj jaroj. Sed intuicio ni jam povas diri: interkompreniĝo inter malsamdevenaj esperantistoj ja ĝenerale eblas (kelkfoje post iom da alkutimiĝo, sed tio okazas ankaŭ en etnaj lingvoj), Esperanto efektive funkcias en interetna komunikado. Sed kiel certiĝi, ke tiu interkompreniĝo plu daŭros post cent aŭ ducent jaroj? Tio ja ne dependas de ni, nek de iu ajn akademio, Fundamento aŭ alispeca aŭtoritato: se internacia komunikado pere de Esperanto restos sub iu certa nivelo, t.e. se Esperanto ne respondos al iu vera bezono, nu, tiam certe estas neniu kialo, por ke la lingvo restu homogena kaj certigu facilan interkompreniĝon. Se, male, Esperanto estos intense uzata en interetnaj informfluoj, tiam la dialektaj diferencoj aŭtomate restos ĉe akceptebla nivelo". (Alain Dawson, en sia artikolo "Ni bezonas dialektologion de Esperanto" al la revuo "Esperanto" 3/1983)

esperanto

PRI KROKODILI...

"Krokodili" aperas en "Plena Ilustrita Vortaro" (PIV-1970) kun jena difino: "paroli nacilingvo en Esperantista modio". Ĝi estas signita kiel slanga esprimo, sed miaopinio ĝi ne apartenas al tiu kategorio, ĉar ĝi ne havas alian signifon aŭ sencon en la norma lingvo, krom se ĝi povas signifi " agi kiel krokodilo". Komparu la sekvajn verbojn pluformitajn surbazo de substantivoj signifantaj bestojn: a. serpenti - iri multflekse kaj ondolinie, kiel serpento". b. simii - "kvazaŭ simio imiti". (...) Rimarku, ke neniu el tiuj vortoj portas la PIV-an slangetikedon. Manke de historia aŭ etimologia vortaro de Esperanto, estas malfacile spuri la originon de "krokodili". Ĉar neniu alia vorto en la norma Esperanto taŭgas por priskribi la daŭre okazantan fenomenon de la krokodilismo en esperantistaj rondoj, la jam profunde enradikiĝinta "krokodili" devas esti klasifikita ne kiel slanga vorto sed kiel esperantismo aŭ esperantonimo, apartaĵo de la zamenhofa lingvo sen ekvivalento aŭ paralelaĵo en aliaj lingvoj. (...) (Willian Auld, en "Heroldo de Esperanto")

ĈEF-REDAKTAS: CESAR DORNELES SOARES - TUTLANDA DISSENDO - ĈIUJ KUNLABORAĴOJ ESTAS ĜOJE BONVENAJ! - UNUOPA PREZO: 200 KR

VERDA KAFO

ĉiun lastan sabaton de la monato

partopronu!

nun en restoracio ka picoj "a bolonhesa", ĉe andrade neves